

Bulgara **ESPERANTISTO**



Nikola Aleksiev. Impona Forumo de la popola unueco . . .	1
* * * La Aŭstra ŝtatestro vekis intereson al Esperanto en Parizo . . .	2
Angel Karalijčev. Popola protektanto. Trad. K. Vâlev . . .	3
Bojka Batalaska. Georgi Dimitrov kaj la junularo . . .	6
Asen Grigorov. Georgi Dimitrov kaj Esperanto . . .	7
Ljudmila Paspaleeva. Intervjuo kun J. Jordanov . . .	10
Atanas Delčev. Aktiva Esperanto-societo . . .	11
Violin Oljanov. La Literatura Rondo gastas . . .	11
Katja Maneva. 15 jarojn Poŝtista E-societo „Heroldo“ en Sofio	12
Bojka Batalaska. Printempa amuzvespero . . .	12
* * * Novaj Esperanto-societoj . . .	12
Teodoro Kulagin. El la vivo de la sovetaj esperantistoj . .	13
Milica Sokolova. Esperanto-novaĵoj el Novosibirsk . . .	14
A. Gr. Senprecedenca heroeco . . .	14
* * * Kubanoj instruas. Informa kampanjo antaŭ la 57-a. La sekvaj UK de Esperanto. Esperanto kaj sociologio. Kursoj kreskas en Rumanio. „Medicinaj informoj“ . . .	14-15
* * * „Turisma Bulgario“ . . .	16
* * * La ruza juĝisto. Trad. J. Markov . . .	16
Najden Valčev. Dimitrova lulkanto. Trad. Sim. M. Simeonov	III
* * * Tra la gazetaro . . .	IV
* * * Prospekto en Esperanto: Békéscsaba, Mannheim .	IV
Georgi Dimitrov en sia kabineto.	

Sur la kovrilpaĝo:

Fotomuntaĵo de John Hartfiela: Georgi Dimitrov antaŭ la faŝista tribunalo en Leipzig 1933

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj. Por eksterlando — 4,28 lv., 5 rubloj, 2,50 dolaroj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifoj: 0,15 lv. por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespondanconoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — bullikigataj senpage.

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bukaresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Ŝvernika, D. 7, kor. 3, kv. 44, V 117 449 Moskva V—449.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.



IMPONA FORUMO DE LA POPOLA UNUECO **(La Sepa Kongreso de la patrolanda Fronto)**

En aprilo okazis la Sepa Kongreso de la plej amasa soci-politika organizaĵo en Bulgario — la Patrolanda Fronto. La Bulgara Esperantista Asocio, kiel ĉiuj amasaj organizaĵoj en nia lando, estas kolektiva membro de tiu plej ampleksa, plej populara, tutpopola organizaĵo.

En la laboro de la Kongreso partoprenis 32 eksterlandaj delegitaroj reprezentantaj landajn frontojn, naciajn demokratiajn movadojn kaj organizaĵojn.

La Kongreso koincidas kun la 30-jara datreveno de post la fondiĝo de la Patrolanda Fronto (1942) kaj kun la 90-jara datreveno de la naskiĝo de ĝia fondinto Georgi Dimitrov.

Post la tralego de raporto pri „La loko, rolo kaj taskoj de la Patrolanda Fronto en la tutpopola batalo por konstruado de matura socialisma socio“ okazis vigla diskutado. Ĉiuj parolintoj konsentis kun la nova rolo kaj taskoj de tiu plej amasa organizaĵo en la solvado de la novaj historiaj taskoj, kiujn metis antaŭ nia popolo la Programo de la Deko Kongreso de la Bulgara Komunista Partio.

La novaj organizaj formoj permesos pli celkonscie altiri ankaŭ nemembrojn al plenumado de tutpopolaj taskoj, do, en kazo de neceso funkcii kiel movado en plej larĝaj formoj.

La ideologia laboro de la Patrolanda Fronto devas helpi al la civitanoj de Bulgario akcepti konsekvencan socialistan idearon, plifortikigi iliajn sentojn de patriotismo kaj proleta internaciismo, pliakrigi ilian pretecon defendi la socialismajn atingojn de la popolo.

Per la raporto kaj la diskutoj la Kongreso esprimis la grandegan signifon, kiun donas nia popolo al la frata amikeco kaj ĉiufanka kunlaborado kun Sovetunio kiel garantio por la nacia sendependeco kaj socialisma evoluo de Bulgario. La Patrolanda Fronto ankaŭ porestante agados por la profundigo de tiu amikeco, por pli aktiva kaj pli vasta propagando de la sukcesoj de Sovetunio kaj de la ceteraj popoloj el la socialisma landaro.

En la jaro, kiam estas celebrata la 90-a jubileo de Georgi Dimitrov, oni ĝeneraligas la historiajn meritojn kaj la klopodojn de la Patrolanda Fronto por kreo de unueco kaj komuna agado de ĉiuj progresemaj kaj demokratiaj fortoj de la lando sub la gvido de la Bulgara Komunista Partio. Tiuj historiaj spertoj certe prezentas intereson por la aktualaj bataloj, organizataj de la progresemaj kaj demokratiaj fortoj en la mondo, luktantaj kontraŭ la imperiismo, por paco, demokratio kaj socia progreso.

En siaj alparoloj kaj en la gazetaro la oratoroj de la eksterlandaj delegitaroj substrekis la grandegajn atingojn de la Patrolanda Fronto kiel batalpreta popolliberiga movado kaj la spertojn, kiujn ili eltiras por si mem el

la giganta laboro kaj instruo de la fondinto de l'Patrolanda Fronto Georgi Dimitrov. Tiuj favoraj opinioj plenigas per sentoj de fiero kaj kontento la korojn de ĉiuj bulgaraj civitanoj.

Nun antaŭ la organizaĵoj kaj komitatoj de la Patrolanda Fronto staras la devo mobilizi la popolamasojn por plialtigo de la socia produktiveco de l' laboro kaj certigi la realigon de la Sesa Kvinjara Plano en intereso de ĉiuj tavoloj de nia socio.

La Patrolanda Fronto sendube kiel ĝis nun sukcesos ankaŭ porestante unueciĝi ĉiujn sociajn organizaĵojn kaj movadojn sekvi la historian vojon al konstruado de matura socialisma socio.

Kune kun la ceteraj organizaĵoj ankaŭ la Bulgara Esperatista Asocio partoprenos la realigadon de tiu nobla programo. Ĝia plena realigo transformos nian patruon el meze evoluinta industri-agrara ŝtato en unu el la plej evoluintaj ŝtatoj de la mondo, kapabla transiri al la konstruado de komunisma socio en nia lando.

La vasta organiza bazo de la Patrolanda Fronto malkovras antaŭ la esperantistaj gvidorganoj kaj organizaĵoj novajn, pli grandajn eblecojn por realigo de esperantistaj aŭ komunaj kun aliaj organizaĵoj iniciatoj. Nun multe dependas de ni, esperantistoj, kapti tiujn pli vastajn eblecojn por publika agado en la intereso de nia popolo kaj de la landa esperantista movado.

13. V. 1972

Per la Ambasadado de Usono en Sofio
Al la Prezidento de Usono, Vaŝingtono

Sinjoro Prezidento,

La mondo atendis renovigon de la intertraktadoj pri Vjetnamio en Parizo, sed ĝi estis maltrankviligita kaj indignita pro Via decido esti minbaritaj la havenoj de la Popola Respubliko Vjetnamio kaj esti detruitaj la transportaj linioj de la lando.

Per tiu ĉi ordono Vi rompas ne nur la elementajn postulojn de la humanismo, sed ankaŭ la plej ordinariajn normojn de la internacia juro.

Per tia senrespondeca konduto la registaro de Usono provokas abruptan akriĝon de la internacia situacio. La postsekvaj povas esti treege tragikaj por la tuta homaro, por la paco en la tuta mondo.

La Mondpaca Esperantista Movado (MEM) esprimas la indignon de siaj adeptoj kontraŭ tiu ĉi sensaga decido de Usono kaj insistas, ke ĝi estu nuligita kiel eble plej baldaŭ.

La nura saĝa eliro el la komencita de Usono agreso kontraŭ Vjetnamio estas renovigi la pacajn intertraktadojn en Parizo kaj meti finon de la agreso.

De tio estas interesataj la popoloj kaj de Vjetnamio, kaj de Usono, kaj de ĉiuj ŝtatoj en la mondo!

Prezidanto de MEM: N. Aleksiev

LA AŬSTRA ŜTATESTRO VEKIS INTERESON AL ESPERANTO EN PARIZO

Kiel konate, en marto ĉ. j. s-ro Franz Jonas, la aŭstra ŝtatestro, estis kelkajn tagojn oficiale en la franca ĉefurbo. Pri tiu vizito ni citas el la radio-informoj de France-Inter de la 23.3.72: „Hieraŭ vespere, dum kunveno kun diplomatoj, la respublikestro de Aŭstrio Franz Jonas kaŭzis sensacion, kiam li subite ekparolis kun kelkaj ĉeestantoj en lingvo, kiun oni ne komprenis. Estis tute simple Esperanto, kies fervora adepto li estas.“

La prezidanto Jonas ekparolis en Esperanto kun reprezentantoj de la Unuiĝo Franca por Esperanto, kiujn li estis invittinta al la kunveno.

DANKON, AL NIAJ GEAMIKOJ!

La CK de Bulgara Esperantista Asocio kaj la Redakcio de „Bulgara Esperantisto“ varme dankas al ĉiuj geamikoj kaj amikaj Esperanto-organizaĵoj, kiuj salutis nin okaze de la Unua de Majo — la Tago de Internacia Solidareco de l' Laboruloj. Ni same tute bone bondeziras al ili sanon, feliĉon kaj novajn sukcesojn sur la kampo de l' laboro kaj en la batalo por paco kaj feliĉo en la tuta mondo!





de Angel Karalijčev

Ĉavdaro* gvidis anaron
guste dudekon da jaroj
kaj estis hajdut' timiga
por riĉeguloj kaj turkoj,
sed por la malriĉularo
li estis ŝirmo sekura!

Ĥristo Botev

La vagonaro estis plenplena de soldatoj-libertempuloj, kiuj veturis suden, al la Kurbiĝo de Ĉerna** kaj Kajmakĉalan, kie la nigra rikoltado ne ĉesadis. Tie la filoj de la bulgara popolo mortis kiel muŝoj, disŝiritaj de obusoj, pafitaj de kugloj de angloj kaj francoj, senfortigitaj de malsato, forbalaitaj de epidemioj. Novembro 1917. La plimulto de la vagonoj estis nekovritaj. Ili ton-drin sur la reloj, grincis malĝojige kaj plenigis per obtuzaj resonoj la tutan ĉirkaŭaĵon. Sur la apudvojaj arboj sidis malvigligintaj korvoj kun malsekaj flugiloj. La soldatoj, enpuŝitaj kvazaŭ brutoj en la ŝarĝvagonojn, kuntirigintaj sub la tendotoloj, rigardis la dezertigintan kamparon kaj silente adiaŭis la agrokampojn, kie velkintaj edzinoj disŝetadis semojn kaj malgrandaj infanoj premadis la lignajn plugilojn al la tero per siaj malfortaj manoj. Tie, kie la vagonaro haltadis, al la vagonoj, antaŭante unu la alian, ekkuradis impete deko da soldatoj, surdorse kun tornistroj. Ili kvazaŭ rapidis atingi laŭeble pli baldaŭ la fajromuelejon por ne preterlasi sian vicon. Plorantaj edzinoj kuris post ili kaj stumblis, malgrandaj

infanoj snufis kaj per large malfermitaj okuloj rigardis la nigrigintajn virojn, la flikitajn soldatmantelojn, la ferumitajn botojn, pendantajn el la vagonpordoj al la radoj. La tuta trajno havis nur unu vagonon por pasaĝeroj. Ĝi estis destinita por oficiroj, kaj la soldata boto ne rajtis eniri tien.

Ĉe iu malgranda stacio, silentanta malantaŭ tilioj, de kiuj falis flava foliaro, la maŝinisto neatendite funkciigis la bremsilojn kaj la vagonoj tondre kunpuŝiĝis. El la atendejo eliris peze ŝarĝita soldato kaj ekklamis suferi al la unua ŝarĝvagono. Post li konfuzite rapidetis maljuniĝinta juna virino kun bunta antaŭtuko kaj nigra kaptuko, kun harplektaĵoj atingantaj ĝis la lumbo kaj belaj enkaviĝintaj plorantaj okuloj. Ŝi pene portis du grandajn blankajn sakojn, premplenigitajn, kaj korbon, kovritan per alkudrita tolo.

— Ĉu estas ĉe vi unu loketo ankaŭ por mi? — demandis la soldato tiujn, kiuj sidis antaŭe — kun pendantaj kruroj.

— Ne estas, frato mia, kien vi ekiris per tiu lama kruro? Kuru malantaŭen! — aŭdigis sin iu barbulo kun pipo en la buŝo.

— He, kuru malantaŭen, mi diras al vi, tie estas malplene! — krudvoĉe ripetis la barbulo, vidinte, ke la lamulo ĉirkaŭrigardas senhelpe.

La soldato ekklamis rapide, kiom li

* Ĉavdaro — fama popola vojevodo, estro de taĉmento de hajdutoj (batalintoj kontraŭ la turka jugo).

** Ĉerna — rivero en Makedonio, kie dum la Unua Mondmilito okazis kelkaj grandaj bataloj inter la bulgara armeo kaj la armeoj de la Entento.

povis. La edzino lin sekvis kiel ombro. Ŝi haltis antaŭ ĉiu vagono kaj petegis:

— Kial vi ne liberigas por li iomete da loko? Li etas lama. Rigardu lin. Ho, dio mia, li restos!

— Iru en la pasaĝeran! Apenaŭ vi trenas vin! Se vin persekutos la angloj, kiel leporo vi kuregos! Pli rapide! — ekkriis la barbulo.

La biletkontrolisto signalis por ekveturo. La lokomotivo ekfajfis. La virino komencis krii:

— Kuru, Venko! Kuru!

La vundito streĉis la lastajn fortojn, ektrenis sian lamantan kruron kaj sukcesis meti piedon sur la ŝtupon de la pasaĝera vagono, kiam la vagonaro jam estis ekmoviĝinta. La virineto kun la enkaviĝintaj okuloj longe kuris paralele kun la vagono, ĝis kiam sukcesis doni al li la sakojn kaj la korbon. Al ŝi ne restis tempo eĉ por ekplori. Sed kiam la lasta vagono fortondris preter ŝi, kvazaŭ frapante ŝian vizaĝon per fera mano, la anhelanta virino levis la antaŭtukon al siaj okuloj kaj ekskuigis.

La soldato eniris la koridoron, haltis ĉe la fenestro de la unua kupeo, metis la korbon ĉe siajn piedojn kaj demetis la tornistron de siaj ŝultroj. Li lasis ĝin sur la plankon, lokis la sakojn ĉe ĝin kaj ekrigardis eksteren. Grandaj pluveroj nebulugis la fenestron. Apenaŭ videblaj estis la agrokampoj, kiujn li estis pluginta kaj rikoltinta. La arboj kuris malantaŭen kaj kvazaŭ svingis al li per nudaj branĉoj kriante: adiaŭ! La soldato sentis pezpremon en la gorgo. Li turniĝis kaj ekrigardis en la kupeon. Tie sidis nur unu homo — bela juna viro kun nigra bukla hararo kaj barbo kiel peĉo, kun grandaj brilantaj okuloj. Civilulo.

Kiam iliaj okuloj renkontiĝis, tiu en la kupeo etendis manon, malfermis la pordon kaj diris:

— Kamarado, eniru, ne staru en la koridoro, ĉar oni povas vin piedpremi.

Mirinda homo — ekpensis la soldato — nomas min „kamarado“ —

kaj ektrenis la sakojn internen. La alia helpis lin loki ilin sur la breton.

— Mi vidis vin tra la fenestro, — li diris. — Malbone vi lamas. Kial vi ne restis en hospitalo?

— Oni min elhospitaligis. Loko ne estis. Oni veturigis peze vunditajn, kaj ni — la pli sanaj — estis elhospitaligitaj.

— Kien vi veturas?

— Al la Kurbiĝo de Ĉerna. Kiel mi altreniĝos ĝis tie per unu kruro, mi mem ne scias.

— Multon vi ekportis, frato mia.

— Ne estas por mi. Mia roto preskaŭ la tuta estas nialoka. Tuj kiam mi elvagoniĝos, ĉiuj ekrigardos al miaj manoj. Malsataj homoj, kion fari. Donacetojn donis iliaj edzinoj. Tio-alio — kaj jen amasiĝis. Hej, mortas pro malsato en la tranĉeoj nia frato!

— Nia frato mortas en la tranĉeoj pro malsato, sed niaj registoj turnis la kanonon ankaŭ kontraŭ Rusion. Al ili ŝajnis nesufiĉa unu fronto . . .

En tiu ĉi momento tra la koridoro pasis militisto kun senhara kapo, oraj epoletoj, grava, okulhava, malafabla. Li ekrigardis fikse tra la fenestro kaj forpasis, malrapidiginte siajn paŝojn.

La soldato ektremis: kolonelo!

— Tuj li prempaŝos min kiel freneza bovino . . . — li diris kaj en tiu momento la kolonelo turniĝis, tiris kolere la tenilon de la pordo, malfermis ĝin kaj kriis:

— Soldato!

La vundito saltis je unu piedo kaj faris salutgeston:

— Mi, sinjoro kolonelo!

— Ĉu vi ne scias, ke tiu ĉi vagono ne estas por ci?

— Jes, mi scias, sinjoro kolonelo . . .

— Do, kion ci serĉas ĉi tie?

— Nenie estis loko por mi, sinjoro kolonelo!

— Li estas vundita, apenaŭ marŝas, kaj la vagonoj estas plenŝtopitaj. Ĉi tie estas loko, li restu — enmiksigis la civilulo.



— Tio ne estas via afero! Kaj ci malaperu el la vagono jam ĉe la unua stacio. Tuj!

— Jes, sinjoro kolonelo!

Batfermite la pordon, la kolonelo ekmarŝis al sia kupeo kun la irmaniero de homo, kiu inde plenumis sian devon.

Tuj kiam la vagonaro malrapidigis sian movadon, la soldato denove ĵetis la tornistron sur la dorson, deprenis la sakojn kaj diris kun maldolĉa rideto:

— Oni forpelis min el la paradizo. Por ili ni ne estas homoj. Se mi ne plenumos lian ordonon, li povas min starigi antaŭ milittribunalo.

La civilulo levigis kaj akompanis lingis la maplena ejo de la bremsisto en la apuda vagono. Liaj manoj tremis pro indigno.

Kiam la vagonaro denove ekmoviĝis, la kolonelo reaperis por kontroli, ĉu lia ordono estas plenumita. Tiam la nigraokula juna viro ekstaris kontraŭ li kaj diris:

— Sinjoro kolonelo, tio, kion vi faris, estas malinda!

— Kion? — ekkriis la kolonelo.

— Mi ripetas: via ago estas malinda. Vi forpelis vunditan bulgaran soldaton, malgraŭ ke la tuta vagono estas preskaŭ malplena.

— Ĉu vi scias, kion signifas militleĝo?

— Krom viaj mitliteĝoj estas ankaŭ aliaj, homaj leĝoj, kiujn evidente vi ne konas. Tiu ĉi malfeliĉa lamanta soldato estas viktimo de via frenezo: anstataŭ finsemi sian agrokampon aŭ almenaŭ resti en hospitalo, ĝis kiam la vundo resaniĝos, li denove rapidas al la fronto, kaj vi ne permesas al li pasigi kelkajn horojn en varma kaj seka loko. Vi forpuŝis lin!

— Kiu vi estas, sinjoro, kaj kiel vi permesas al vi paroli al mi per tiaj vortoj?

— Mi estas popola deputito.

— Kiel vi estas nomata?

— Mia nomo estas Georgi Dimitrov,

el la partio de la mallarĝaj socialistoj*.

— Kien vi veturas?

— Mi ne estas devigata raporti al vi.

— Vi veturas por ribeligi la soldatojn. Sed mi instruos vin!

— Vi nenion povas instrui al mi, ĉar vi nenion scias, sed tiu, kiun vi forpuŝis, forgesos vin neniam!

El la apudaj kupeoj montris siajn kapojn kelkaj oficiroj. La kolonelo tuj turniĝis kaj ruĝiĝinta kiel kankro ekpaŝis furioze tra la koridoro.

En tiu vagono, kiu veturis al la suda fronto en 1917 jaro, renkontiĝis tri homoj. Unu — inspiranto de tiuj, kiuj laŭ la vortoj de Anton Straŝimirov**, poste „buĉos sian popolon tiel, kiel turko ĝin ne buĉis“; alia — plugisto kaj laboristo, patro de la junuloj, kiuj post kvaronjarcento kun armilo en la mano ekmarŝos laŭ la hajduta vojeto de Botev kaj Levski tra la montoj, kaj la tria — unu el la plej grandaj viroj de nia epoko, la sentima batalanto por justeco kaj komunismo. Dum tiu pluvoza tago li veturis al la suda fronto por rakonti al la bulgaraj soldatoj pri la unuaj fulmotondroj de la Granda Rusa Oktobra Revolucio. Pro la ĵus rakontita protekto li estis kondamnita je tri jaroj da malliberigo.

Ekstere faladis novembra pluvo. La vagonoj puŝiĝadis kiel ŝafaro, pelata de kruela paŝtisto.

El bulgara: Kunĉo VÂLEV

El la libro „Amboso aŭ martelo“

* Partio de la Mallarĝaj Socialistoj — revolucia marksisma partio en Bulgario, kiu en 1919 j. transformiĝis en Bulgaran Komunistan Partion (diference de Partio de Larĝaj Socialistoj — burĝa socialista partio).

** Anton Straŝimirov (1872—1937) — bulgara verkisto kaj sociaganto, kiu protestis kontraŭ la faŝista regpotenco defende al la viktimoj de la fama Septembra Ribelo de 1923 j.

En sia multflanka agado de revoluciulo la elstara filo de la bulgara popolo Georgi Dimitrov turnis grandan atenton al la pobletoj de la junularo. Ne nur ĉar li konsciis la fakton, ke la junularo estas la estonteco de la mondo, sed ankaŭ pro tio, ke li mem spertis kaj travivis multon, fariĝinte laboristo jam en frua junaĝo. Dekkvarjara Dimitrov komencis perlabori sian panon en presejo „Libera Voĉo“. Tie li partoprenis la unuan ĝeneralan strikon de la presistoj en Bulgario, organizinte 50—60 el siaj junaj kolegoj. Pli malfrue li fariĝis aktiva aganto de la Laboristaj Sindikatoj kaj dediĉis multan energion por defendi la interesojn de la laborista junularo.

Georgi Dimitrov estis iniciatinto de la unua pure junulara gimnastika societo „Junularo“, kiu havis tre aktivan politikan, kulturen kaj sportan vivon.

Li estas unu el la fondintoj de la Unuiĝo de la Laborista Socialdemokratia Junularo de Bulgario en 1912 j. Dum la jaroj de l'sanga faŝismo tiu unuiĝo perdis multajn el siaj membroj, kiuj falis mortpafitaj surstrate kaj en la montaroj kiel partizanoj aŭ estis mortturmentitaj en la faŝistaj malliberejoj. Tiu aktiva batalo de la progresema junularo en Bulgario estas rezulto ankaŭ de la senlaca laboro de G. Dimitrov por kreado de vasta kontraŭfaŝista fronto. Antaŭ la VI-a kongreso de la Komunista Internacio de l'Junularo en 1935 li klarigis la taskojn de la junularasocioj en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj ĉia reakcio jene: „Ni atendas, ke la Komunista Internacio de la Junularo agos tlel, ke ĝi povu unuiĝi ĉiujn profesiajn, kulturajn, klerigajn, sportajn organizaĵojn de la laboranta junularo, ĉiujn revoluciajn, nacirevoluciajn, naciliberigajn kaj kontraŭfaŝismajn junularajn organizaĵojn en batalo kontraŭ la faŝismo kaj la milito, por la rajtoj de la juna generacio“.

Post la liberiĝo el la faŝismo kaj la kapitalismo laŭ konsiloj de Dimitrov kreiĝas Infana-Junpionira Organizaĵo „Septemvrijĉe“ (1946 j.) kaj la Unuiĝo de la Popola Junularo (1947 j.). Iliaj ĉefaj taskoj estis eduki siajn membrojn en spirito de patriotismo, internaciismo, de fideleco al nia socialisma patrolando, de amo al la laboro kaj la scienco. Kiel simbolo de arda amo al la patrujo restas la grandaj konstrufaroj de l'junularaj brigadoj organizitaj larĝskale en la libera Popola Respubliko post la Dua Mondmilito: la Trapasejo de la Respubliko, urbo Dimitrovgrad, la barajlago „G. Dimitrov“ k. a.

Grandan atenton G. Dimitrov turnis al la lernanta kaj studenta junularo. Li estis arda adepto de la ideo pri transformo de l'Universitato en fajrujon de progresema scienco. Sian kredon en la fortoj de la juna generacio li esprimis jene: „Mi dezirus, ke ĉiu alia lando — eŭropa aŭ amerika — havu tian studentaron, kia la bulgara, kvankam ĝi havas ankaŭ malperfektaĵojn kaj difektojn, kiujn oni devas forigi.“ Ne estas hazarde, ke ĝuste laŭ ideo de Dimitrov oni konstruis la studentan urbeton en Sofio, kie nun vivas kaj studas miloj da studentoj.

Ne estas eble mencii aparte ĉion, kion faris Georgi Dimitrov por la junularo ne nur en Bulgario. Per sia tuta vivo, agado kaj batalo la grandega filo de nia popolo instruas kaj gvidas la junularon de la mondo al kuraĝo kaj senĉesa batalo kontraŭ la malhelaj fortoj de reakcio, imperiismo kaj militarismo — por paco kaj demokratio, por pli bona, feliĉa vivo.

Bojka BATALSKA

La estonto apartenas al tiu, al kiu apartenas la junularo.

G. Dimitrov



Antaŭ 23 jaroj mi skribis pri Georgi Dimitrov kaj lia rilato al Esperanto*. Nun mi denove volas skribi pri tiu ĉi tempo, ne nur ĉar de tiam pasis tiom longa tempo, sed ankaŭ ĉar tie kaj tie en la Esperanta mondo aperis malĝustaj eldiroj, skribaĵoj kaj opinioj pri Dimitrov kaj lia rilato al Esperanto.

Mi citos du tiajn okazojn.

En 1954 mi estis gasto ĉe la esperantistoj en Budapeŝto. En interparolo kun mi li konata Esperanto-poeto kaj verkisto Julio Baghy, evidente volante surprizi min, diris:

— Ĉu vi scias, ke Georgi Dimitrov estis esperantisto?

Mi respondis, ke tio ne estas ĝusta, ke Dimitrov ne estis esperantisto.

Eĉ kiam mi klarigis al Baghy, kiel fakte statas la afero pri G. Dimitrov kaj lia „esperantiseco“, li iom nekredeme rigardis al mi, ne sciante kio estas vera kaj kio ne; videble li preferis, ke la malĝusta onidiro evidentiĝu ĝusta.

Kaj alia okazo. Nur antaŭ nelonga tempo mi legis la libron „Pri internacia lingvo dum jarcentoj“ de Isaj Dratwer; ĝi estas eldonita kiel oficiala dokumento de la Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio. Sur paĝo 112 de la libro s-ro Dratwer citas parton de mia artikolo pri G. Dimitrov, ĉi-supre menciita.** Sub la citaĵo li skribas: „*Letero al bulgaraj esperantistoj*“ (substreko mia. A. G.) kaj „*Sekretario Asen Grigorov, Sofio (1945—1946)*.“

Se iu volus legi „leteron“, li vane ĝin serĉus, ĉar tian leteron Dimitrov neniam skribis: li *parolis* al mi siajn pensojn.

Ĉiu povas kompreni, ke neĝusteco ĉe tiaj aferoj povas nur esti mal-

fidon al ni, kompromiti nin, malutili nian Movadon.

*

Mi havis la feliĉon esti sekretario de Georgi Dimitrov tuj post lia reveno en Bugario, 1945. Kvankam mia sekretarieco daŭris ne longe (1945—1946), mi konservis pri Dimitrov neforgeseblajn, karajn rememorojn. Tiujn el ili, kiuj rilatas al Esperanto, mi raportos ĉi-sube.

Kelkajn tagojn post mia sekretariigo, en novembro 1945, mi petis la permeson de G. Dimitrov paroli dum kelkaj minutoj pri Esperanto. Li tuj donis ĝin.

Mi starigis la problemon pri Esperanto sur praktika bazo. Mi ne parolis pri estontaj ebloj de la lingvo, ne teoriumis ĝenerale, ne donis perspektivojn izolitajn de la kuranta momento, sed priskribis la nunan praktikan agadon de la bulgaraj esperantistoj.

En parentezoj mi devas diri, ke en 1945 la situacio de nia patrujo tute ne estis roza. Pro la perfida faŝista politiko de la bulgaraj burĝaj registaroj antaŭ la 9-a de septembro 1944 Bulgario estis internacie izolita. Malgraŭ la radikala ŝanĝo post la popola venko, la okcidentaj ŝtatoj ankoraŭ traktis Bulgaron kiel aliancanon de Hitler-Germanio. Antaŭ ĉio ni trovigis en stato de milito kun multaj landoj de la mondo. Bulgario estis venkita, izolita, apenaŭ transirinta la mallarĝan ponteton de nacia katastrofo, al kiu estis ĝin puŝinta la malbenita faŝismo. . .

— Kamarado Dimitrov, — mi diris, — ni, bulgaraj esperantistoj, ne neglektas eĉ la plej etan eblecon kontakti kun niaj alilandaj amikoj, klarigi al ili nian situacion, informi ilin pri nia rezista movado, pri niaj luktoj kontraŭ la faŝismo, pri la viktimoj, kiujn ni donis, sciigi al ili niajn personajn progresojn ĉe la restarigo de nia detruita ekonomio, peti ilian moralan apogon al nia deziro aliĝi al la

* „Tri interparoloj kun G. Dimitrov“, „Internacia Kulturo“, n-ro 7, 1949, Sofio.

** Temas pri la sugesto de G. Dimitrov, ke ni, bulgaraj esperantistoj, devus eldoni broŝuron en Esperanto pri Bulgario.

familio de la demokratiaj popoloj. Kiel bonaj patriotoj, amantaj nian patrolandon kaj nian popolon, ni uzas Esperanton kaj ni havas bonajn rezultojn. Ni renodis multajn kontaktojn interrompitajn de la milito. Ni vastigis la reton de niaj korespondantoj internaciaj. Grave akcelas nian agadon ĉi-rilate nia revuo „Internacia Kulturo“.

Kamarado Dimitrov aŭskultis min atente. Kiam li aŭdis pri la agado, kiun ni per niaj nemultaj fortoj faris, li mem komencis paroli. Li diris:

— Vi devas daŭrigi vian agadon. Antaŭ ĉio vi devas verki kaj eldoni broŝuron pri nova demokratia Bulgario, pri ĝia esenco, pri ĝiaj sukcesoj sur la kampo de la rekonstruado ekonomia, sociala, politika kaj kultura. Vi estas neŭtrala organizo, viaj vastaj ligoj kun alilandaj Esperanto-medioj estas valoraj, kaj vi devas ilin bone uzi. Samtempe — li admonis — vi devas esti atentemaj kontraŭ provoj de provoka kaj spiona karaktero.

Mi demandis lin, ĉu mi, estante lia sekretario, rajtas daŭrigi en eksteroficaj horoj la redaktadon de „Internacia Kulturo“.

— Jes, vi rajtas — li diris, substrekante sian konsenton per jesa gesto de la kapo.

Fine mi demandis k-don Dimitrov, ĉu li rememoras, ke en la nomo de la unua libera Esperanto-kongreso en aŭgusto 1945 ni sendis al li en Moskvo niajn salutojn kaj ke li respondis per speciala telegramo.

— Jes, — li ridetis, — mi tiam respondis al ĉiu organizaĵo, kiu rilatis al mi. Mi memoras pri via saluto kaj pri mia telegramo.

Per tio mia unua interparolo kun k-do Dimitrov pri Esperanto finiĝis.

La broŝuron pri nova Bulgario verkis k-do Vitali Julzari, membro de la redakta komitato de „Internacia Kulturo“. Pro nia tiam mizera prestekniko tamen la broŝuro ne povis aperi aparte, la manuskripto estis minacata de malaktualiĝo pro la rapidege okazantaj pro-

gresaj ŝanĝoj en nia popoldemokratia ŝtato; tial ni publikigis la plejparton de la ĉapitroj de la broŝuro kiel serion de artikoloj en „Internacia Kulturo“.

*

La dua interparolo kun k-do Dimitrov pri Esperanto okazis en januaro 1946. La preteksto estis jena.

K-do Kunĉo Vălev, tiam studento de filologio en la Sofia Universitato, korespondis kun belga studento de pedagogio. Unu el la korespondaĵoj de k-do Kunĉo Vălev, en kiu li skribis pri G. Dimitrov, tiom plaĉis al la belga korespondanto, ke li ĝin sendis al la redakcio de belga gazeto, kiu publikigis ĝin sur la unua paĝo kune kun portreto de la heroo de Leipzig. Ekzemplero de tiu ĉi gazeto trafis en miajn manojn, kaj mi tuj montris ĝin al k-do Dimitrov. Li rigardis la gazeton kaj ridetante diris:

— Aha, Esperanto!

Efektive, en redakcia noto estis dirite, ke la korespondaĵo estas ricevita pere de Esperanto. Mi diris:

— Ni ricevas gazetojn el alilando, en kiuj aperadas materialoj pri Bulgario dank' al nia peresperanta agado.

— Tio estas bona, — li diris.

La ekzemplero de la belga gazeto, kun la ruĝe kadrita Esperanta korespondaĵo, dum longaj tagoj kuŝis sur la skribotablo de la glora gvidanto de la bulgara popolo.

*

La trian interparolon kun k-do G. Dimitrov pri Esperanto estis tiel mallonga, kiel la dua. Dum certa tempo nia gazeto „Internacia Kulturo“ havis seriozajn malfacilaĵojn pri papero. Mi devas klarigi, ke en Bulgario tiutempe estis produktata tre malmulta papero; plejparte ĝi estis importata el alilando. La rapidega progreso de la kulturo kaj speciale de la libro- kaj gazeteldonado estigis ĉe ni seriozan paperkrizon.

Ni, la tiamaj pioniroj de la Movado, aplikis multajn klopodojn por havigi



paperon por niaj eldonaĵoj, kaj nur kun granda peno sukcesadis savi la situacion kaj daŭrigi regule eldoni „Internacia Kulturo“. Sed foje, en marto 1946, ĉiuj niaj klopodoj puŝiĝis kontraŭ ŝtonon, kiel oni en Bulgario diras.

Por esti justa, mi devas diri, ke la tiama ministro de la Informado estis komplezema, kaj komprenante la signifon de nia agado, ĉiam bonvole kontentigis niajn postulojn, koncernantajn la eldonadon de la gazeto. La oficistoj en la Ministerio tiutempe tamen kelkfoje procedis burokrate kaj per tio bremsis nian agadon. Foje mia pacienco estis elĉerpita, kaj mi rekte starigis la demandon ĉe k-do Dimitrov.

Klarigante la aferstaton al li, mi demandis:

— K-do Dimitrov, ĉu mi povas *en via nomo* postuli paperon por nia Esperanto-revuo?

— Jes, — li respondis, — vi povas. Mi dankis lin kun ekspiro de faciligo.

Efektive, post tiu ĉi okazo ni ne plu havis embarasojn ĉe la havigo de papero.

*

Post kelka tempo, pro malsaniĝo, mi transiris al alia laboro. Malgraŭ tio mi havis ankoraŭfoje kontakton kun Georgi Dimitrov lige kun Esperanto. La okazo estis jena.

En 1947 angla s-ano S. R. Marshall sendis al k-do Dimitrov adreson, subskribitan de kelkaj anglaj kamaradoj en la nomo de ĉirkaŭ mil londonaj estimantoj de la senmorta G. Dimitrov. En la anglalingva letero estis menciita ankaŭ la rolo de Esperanto ĉe tiu ĉi okazo*. Kelkajn tagojn post kiam k-do

Dimitrov ricevis la adreson, mi estis telefone vokita de lia sekretario Cvetko Banĉev (ankaŭ esperantisto!), kiu sciigis al mi, ke k-do Dimitrov komisias al mi respondi en lia nomo al la londonaj kamaradoj. Mia ĝojo estis duobla, unue, ĉar li denove donis pruvon, ke li ne malatentas nian lingvon kiel perantan kaj organizantan faktoron, kaj due, ĉar li montris fidon al mia persono, komisiante al mi respondi en lia nomo.

Nature, mi tuj sendis la respondon, kiun la legantoj de „Internacia Kulturo“ havis la okazon legi en n-ro 13—14/1947.

*

Mi revenas al la enkondukaj linioj de ĉi tiuj rememoroj.

Georgi Dimitrov, la gvidanto de la bulgara popolo, la legenda heroo de Leipzig, la fondinto de popola Respubliko Bulgario, ne estis esperantisto. Sed li amike rilatis al nia afero, al Esperanto kiel unu el la lingvoj, per kiu ni, kiel bonaj patriotoj kaj konsekvencaj internaciistoj, povas servi al nia socialisma patrolando.

Okaze de la 90-jara jubileo de G. Dimitrov la bulgara popolo gloras lin kaj lian grandiozan faron. Ankaŭ ni, esperantistoj, eterne konservos en niaj koroj la memoron kaj la dankon al la granda bulgaro kaj eminenta aganto por progreso kaj socialismo de la homaro.

Asen GRIGOROV

* Post kelka tempo mi petis s-anon Marshall sendi al mi kopion de la salutletero, adresita al G. Dimitrov, sed li ne povis plenumi mian peton, ĉar ankaŭ li mem ne posedis ĝin.

GRAVA REKONO

La Sepa Kongreso de la Patrolanda Fronto, kiu okazis je la 20—22 de aprilo ĉ. j., elektis la prezidanton de la Bulgara Esperantista Asocio k-don Nikola Aleksiev kiel membron de la Prezidiumo de la Patrolanda Fronto.

INTERVJUO

*kun k-do Jordan Jordanov — prezidanto
de la Distrikta Komitato de BEA en Smoljan*

Delonge mi deziris konatiĝi kun k-do Jordanov. Multfoje mi estas aŭskultinta kaj leginta pri lia konstanta aktiveco, pri lia neelĉerpebla energio sur la verda kampo.

En la E-klubejo de „Rodopa Stelo“ li ne estis. Mi trovis lin en lia oficejo — la Distrikta Direkcio de l'Arbaroj. K-do Jordanov estis tre surprizita de mia neatendita vizito, sed — laŭ sia karaktero — restis trankvila kaj afable respondis al miaj demandoj. Kun la legantoj de „Bulgara Esperantisto“ mi plezure dividos kelkajn momentojn el nia konversacio.



Demando : K-do Jordanov, mi provas imagi al mi vian urbon komence de julio, dum la tagoj de nia 38-a kongreso. Ĉu vi atendas multajn gastojn?

Respondo : Jes. Eble unuafoje en Smoljan gastos samtempe tiom multe da homoj — ni supozas, ĉirkaŭ 1500.

D. : Ĉu ankaŭ eksterlandaj samideanoj?

R. : Ni atendas pli ol 100.

D. : Ĉu estos sufiĉe da loĝejoj por ĉiuj?

R. : Certe. . . se ni havas la feliĉon esti dommastroj de tiel grava arango kiel nia nacia Esperanto-kongreso. . .

D. : Pro kio pli konkrete via distrikto meritis tiun honoron?

R. : Ĉe la pasinta 37-a E-kongreso ni, smoljananoj, ricevis la honoran transiran standardon de Bulgara Esperantista Asocio pro nia bona laboro. Tiam ni proponis nian urbon kiel kongresan. Mi kredas, ke la kongreso ĉi tie estos plensukcesa en ĉiu rilato. Mi opinias

ankaŭ, ke en Smoljan kaj ĝia distrikto estas sufiĉe da vidindaĵoj por ĉiuj.

D. : Vere, ĉe vi oni tre klare vidas, kiel la pasinteco renkontiĝas kun la nuntempo de nia popolo, ĉu ne?

R. : Jes. Tamen ĉi tie por la gastoj estos interesaj ne nur la historio, la folkloro kaj la novaj konstruaĵoj, sed ankaŭ la Esperantomovado.

D. : Mi jam vizitis vian klubejon kaj tuj mi komprenis, ke la esperantistoj en via distrikto laboras aktive. Tie tre plaĉis al mi la bone aranĝita biblioteko, la tabloj kun multe da Esperantaj gazetoj, revuoj, prospektoj kaj aliaj esperantaĵoj. Tio ĉi kreas hejmecon, invitas la vizitanton sidiĝi, legi, resti en la ejo. Kaj samtempe tio montras la kreskadon de la E-movado ĉe vi. Verŝajne vi diros ion pli konkretan tiurilate, ĉu ne?

R. : Ĉe ni la E-movado vere viglas. Malgraŭ ke nia distrikto estas negranda laŭ loĝantaro, ni havas 525 membrojn, 61% el kiuj estas junuloj.

D. : Bonege! Kiu helpas vin propagandi tiel sukcese Esperanton?

R. : La gvidantoj de la Komunista Partio kaj de la Distrikta Popola Soveto. Ili helpas nin per mono kaj per komprenado.

D. : Ĉu inter la bulgaroj-maĥometanoj estas esperantistoj?

R. : Jes, multaj. Mi deziras substreki tre ĝojigan fakton: lastatempe ili konscie ŝanĝas siajn turkajn nomojn. Multaj jam forjetis ĉi restaĵon de la kruela kvinjarcenta osmana juko, kiam multloke en Rodopi la bulgara loĝantaro estis devigata akcepti la islamon kaj turkiĝi. . . Nun la homoj jam komprenas la tragedion de siaj praavoj kaj rekonsciiĝas. . .

D. : Kio ankoraŭ kontribuas por la sukcesoj de la E-movado ĉe vi?

R. : La Internaciaj Esperanto-kursoj, kiujn ni jam kelkajn jarojn organizas en Smoljan kaj en la ripozloko Pamporovo. La instruistoj en tiuj kursoj estas altkvalifikitaj, la laboro —



bone organizita. En la kursoj partoprenas esperantistoj el Pollando, Hungario, Jugoslavio, Sovetunio, GDR k. a. Ankaŭ en multaj loĝlokoj de nia distrikto oni grupe lernas Esperanton. Multaj niaj esperantistoj veturas al diversaj E-aranĝoj en eksterlando — Hungario, Pollando, Sovetunio k. a. Pasintjare ses studentoj el la Instruista Instituto de Smoljan vizitis Francion.

D.: Kiam vi mem esperantiĝis, k-do Jordanov?

R.: Ho, delonge, jam kiel gimnaziano. Estante lernanto en urbo Bjala, distrikto de Ruse, iun vesperon mi promenis kun miaj samlernantoj. Ili havis gastojn el eksterlando kaj tute neatendite mi troviĝis en Esperantista medio. La tutan vesperon mi silentis kaj sentis min tre maloportune. Kaj tuj mi komencis lerni Esperanton.

D.: Kiamaniere vi ligas vian profesion kun via poresperanta agado?

R.: Mi estas ekonomiisto kaj okupiĝas pri la novaj specialistoj por la mont-arbaroj. Ofice mi veturas multe, migras tra la montaro, konas multe da homoj, kaj ĉio ĉi tro helpas al mi.

D.: Kvankam vi estas el Norda Bulgario, mi rimarkis, ke vi tre ŝatas Rodopi-montaron.

R.: Jes. Sed mi amas ĝin kune kun ĝia loĝantaro, tiel multe suferanta en la pasinteco, kiu dum la jaroj de la popola regpotenco vekigis el sia jarcenta dormo kaj postrestado kaj

Mi dankis al k-do Jordanov pro lia afableco kaj aliaŭis lin, profunde, konvinkita, ke mi interparolis kun homo, kiu vere sindone laboras por Esperanto, por la Esperanto-Movado.

Ljudmila PASPALEEVA

ORGANIZA VIVO

AKTIVA ESPERANTO—SOCIETO

E-Societo „Trakia Lumo“ en urbo Marica estas fondita en 1964 de 15 esperantistoj. Nun ĝi havas 59 membrojn. Lige kun la antaŭstaranta 38-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj la membraro kreskos almenaŭ per 10 novaj samideanoj.

La Societo estas kolektiva membro de Bulgara Esperantista Kooperativo. Ĉe ĝi funkcias junulara grupo kun 12 membroj. En la Semajno de Internacia Amikeco ĉ. j. ĝi preparis grandan agittabulon kaj ĝia prezidanto prelegis antaŭ la loka radio-reto. Pli ol la duono de la esperantistoj abonis E-gazetojn.

La 15-an de marto la Societo aranĝis leter-vesperon. Evidentiĝis, ke la membroj korespondas kun 12 landoj.

Ĉis la fino de majo estos kolektita la membrokotizo por la kuranta jaro.

Al la 38-a Kongreso la Societo sendos 3 delegitojn kaj kelkajn gastojn.

At. Delčev

kuraĝe ekiras vojon de ekonomia kaj kultura supreniĝo. Kaj vere la naturo de Rodopi estas ĉarma. Rigardu ĉi belecon kontraŭe. Mi kredas, ke ĝi plaĉos al ĉiuj kongresanoj.

D.: Jes, sendube. Sed vi nepre devas montri al ili la plej gravajn rimarkindaĵojn de via distrikto. Kion vi planas tiurilate?

R.: Dum la kongreso ni organizos ekskursojn per aŭtobusoj al Pamporovo, vilaĝo Trigrad, Elĵupria, la monumento de la heroo kontraŭ-faŝisto-esperantisto Diĉo Petrov, la monto-pinto Snejanka, la Smoljan-lagoj, la novaj urboj Madan kaj Rudozem k. a. Al la kongresanoj ni montros la etnografian kaj historian muzeojn en Smoljan, la malnovan preĝejon kaj la muzeon en Ustovo k. a. Nun ni presigas specialan atlason pri tiuj ĉi lokoj kaj objektoj.

D.: Ĉio ĉi vere plezurigos la kongresanojn. Sed ĉu vi ne diros koncize ion pri la kongresa programo?

R.: La programo estas sufiĉe riĉa kaj varia. Krom la laborkunsidoj estos ankaŭ „Rodopa, Vespero“ kun riĉa folkloro muzikprogramo, literatura-muzika Esperanta vespero, kiun partoprenos bulgaraj kaj supozeble ankaŭ eksterlandaj E-artistoj, kongresa balo, mitingo, ekspozicioj k. a. Sed anticipe paroli pri tio estas iel maloportune. Pli bone estas paroli per faktoj, ne per promesoj.

LA LITERATURA RONDO GASTAS

Kune kun esperantistoj el Kazanlâk ankaŭ la printempo venis al la fervojstacio por renkonti la karajn gastojn. Grupo da membroj de la Sofia Literatura Rondo respondis al la invito de E-Societo „Roza Valo“. Kun ili venis ankaŭ gastanta jugoslavia samideano. La renkontiĝo, kompreneble, estis ĝoja kaj elkora. La 12 sofiaj gastoj en bona humoro postsekvis la dommastrojn al la urbo.

La sabata posttagmezo estis agrable varma kaj parto de la grupo decidis viziti unu el la plej maljunaj kaj malnovaj esperantistoj en nia lando — s-anon Penko Petrov. Tiu estis agrable surprizita. La viglaj movoj kaj la enviinda memorkapablo, kiu evidentiĝis en la rakontado de rememoroj el la Esperanto-movado, ne perfidis lian 92-jaran aĝon. Li ĝoje akceptis la inviton viziti la posttagan recitadon kaj plenumis la promeson.

Je la 10-a de aprilo matene en bela salono kunvenis ĉirkaŭ 50 samideanoj, inter kiuj

ankaŭ el Ŝipka, Stara Zagora, Karlovo k. a. Malfermis la kunvenon la prezidanto de la kazanlâka E-Societo Dimo Martinov, kiu komisiis al Svoboda Damjanova gvidi ĝin. Profesoro Stojan Ĝuĝev en mallonga parolo skizis la laŭdindan laboron de la Rondo kaj la gravan rolon de ĝia gvidanto Asen Grigorov. La ĉeestantaj rondanoj legis siajn rakontojn kaj versaĵojn. Fine Asen Grigorov rakontis pri siaj kontaktoj kun la gvidanto de la bulgara popolo Georgi Dimitrov. Ĉe la fermo D. Martinov dankis kaj disdonis memordonacetojn al la rondanoj.

Dum la tuta mateno en la salono regis agrabla kaj intima atmosfero. Posttagmeze okazis ekskurso al Ŝipka.

Tiu gastado certe impulsos la kazanlâkajn samideanojn por ankoraŭ pli vigla agado. Ĉi alblovis per freŝa aero ankaŭ la rondanojn kaj certe influos ilin por krei novajn verkojn.

Violin Oljanov


15 jarojn Poŝtista E-Societo „Heroldo“ en Sofio

La 22-an de marto — la unua tago de la printempo. Agrabla, freŝa vetero. Jam ekfloris la unuaj arboj. . .

Ni, heroldanoj, pli ol 30 personoj, kolektiĝis en restoracion „Ruse“ por celebri la 15-an jaron de nia amata E-Societo „Heroldo“. Per kelkaj vortoj k-do Asen Grigorov priskribis ĝian supreniron. Fondita de plenmano da entuziasmaj poŝtistoj, nun la Societo nombras pli ol 100 anojn. Nur nia ege ŝatata k-do Dimitr Karagjozov — la fondinto de la Societo, ne estas inter ni. Li forpasis antaŭ 3 jaroj.

Ni pasigis kelkajn horojn en bonega amika atmosfero.

Katja Maneva



PRINTEMPA AMUZVESPERO

Fine de marto c. j. en la Kulturdomo de Komerclaboristoj en Sofio okazis bela printempa amuzvespero de la sofiaj esperantistoj. Ĝin ĉeestis pli ol 150 personoj.

La programon malfermis kaj gvidis la aktorino Belka Beleva, kiu ankaŭ recitis belan versaĵon pri la printempo. Sekvis „Bulgario“ de G. Ĝagarov (tradukita de Tempesto), majstre recitita de Morjanka K. Văleva, lernantino. Ĵorĵeta Zdraveva, ankaŭ lernantino, same multe plaĉis al la publiko. Ŝi recitis versaĵojn de la E-poetino Ljuba Bojaĝieva. Multajn aplaŭdojn elvokis „Ŝerco“, plenumita de Minail Ĉobanov. La amuzsceno „Familia matĉo“ aparte plezurigis la publikon per sia humoro kaj majstra prezento de niaj karaj geaktoroj-esperantistoj Belka Beleva kaj A. Anev. Post la juna s-anino Radka Ganĉeva, kiu recitis la fabelon de Krilov „Abelo kaj Muŝo“, sur la scenejo aperis la aktorino Kostadinka Nedeva, nia samideanino, kiu talente plenumis humoraĵojn provokante tondrajn aplaŭdojn. Ĉe la fino la publiko aŭdis belan programon plenumitan de la kantisto-esperantisto Miŝo Zdravev kaj la junulara orkestro ĉe la popola legejo „Ŝaznanie“ (Konscio). La vespero finiĝis per dancado kaj amuzludoj, kiuj plaĉis al ĉiuj.

Tiu sukcesa aranĝo montras, ke ĉio, kio estas bone preparita, vekas intereson ankaŭ ĉe neesperantista publiko kaj helpas la disvastigon de Esperanto.

B. Batalska

NOVAJ ESPERANTO-SOCIETOJ

Popovo. En la Mezgrada Politeknika Lernejo „Ĥristo Botev“ instruas Esperanton nia energia k-dino Vâlka Dankova, regula instruistino de franca lingvo. Ĉi tie oni jam fondis novan Lernantan E-Societon „Amikeco“ kun 20 membroj, kiu aktive laboras. Ĉiuj gekursanoj estas abonantoj de nia asocia organo,

Ihtiman. Nova E-societo estis fondita ankaŭ en urbo Ihtiman. Ĝi ricevis la nomon „Boris Novanski“ — nomo de elstara esperantisto en la urbo, kiu pereis en la batalo kontraŭ la faŝismo. Prezidanto de la nova S-to estas V. Nankinski — direktoro de fundamenta lernejo.

La estraro bone ekagis kune kun la Urba Komitato de Komsomolo, havante la subtenon de la UK de BKP. Bone funkcias E-kurso sub gvidado de k-dino Stojanka Alaĝova.

E-KURSO EN TEKNIKUMO

Komence de 1972 en la teknikumo de socia nutrado en Veliko Târnovo estis malfermita E-kurso. Partoprenas ĝin 25 gelernantoj el la unuaj kursoj. Gvidanto — Olga Cankova, instruistino de franca lingvo kaj Esperanto. (Vd. la foton).

Iv. Vojnova



Ne nur en Moskvo, sed ankaŭ en multaj aliaj urboj de la vasta Soveta lando la E-movado ĉiam havas interesajn novaĵojn. Pri kelkaj mi penos sciigi ĉi-sube

Ufa (Baŝkirio). Tie la sukcesa E-agado vidiĝas en la vastaj kontaktoj de la lokaj esperantistoj kun la Distrikta Komitato de Kom-somolo, en la fruktodona laboro de la E-rondeto, en la ofta aperado de artikoloj pri Esperanto en la lokaj ĵurnaloj. Aktive laboras junulara E-grupo sub la gvido de Boris Kolker.

Riga (Latvio). En la loka ruslingva junulara ĵurnalo „Sovetskaja Molodjoŝ“ (Soveta Junularo) ĉiudimanĉe aperas speciala anguleto sub titolo „En la lingvo de amikeco Esperanto“, kie oni lokigas artikolojn pri E-eventoj. Ekz. en la lasta n-ro (61-a) aperis kvin artikoloj, inter kiuj unu granda — de la ĵurnalisto A. Ĥarkovskij pri la poeto Miĥail Isakovskij, kiu estis esperantisto.

Tallinn (Estonio). Dank' al klopodoj de la E-Klubo en la komenco de la nuna jaro aperis bele eldonitaj en Esperanto verkoj de la ŝatata estona verkistino Lilli Promet sub titolo „Kuŝanta tigro“, riĉe ilustrita. La sama eldonejo „Eesti Raamat“ (Estonia eldonejo) preparas eldoni en Esperanto la jenajn beletrajn verkojn: „Okupacio“ de E. Krusten (ricevinta ŝtatan premion en 1969 j. de ESSR), „Estonio“ — ĉ. 40-paĝa broŝuro kun koloraj bildoj, „Kiel vivus vi?“ — kolekto de la estona poezio, tradukita esperanten de Hilda Dresen, ĉ. 200 pĝ., riĉe ilustrita. Tio estas bona pruvo pri la sukcesoj de la E-movado kaj vera kontribuo al la fama 50-jara jubileo de la fondiĝo de l'Unuiĝo de Sovetaj Socialistaj Respublikoj.

Konsiderante la neceson utiligi ĉiujn organizajn metodojn kaj formojn de agitado, kapablajn disvastigi la ideojn de paco kaj frata amikeco, oni aranĝas en vilaĝo Haädemeeste (distrikto Pärnu) sur la balta marbordo de la 29 de julio ĝis la 6 de aŭgusto 1972 la XIV-an Baltlandan Esperanto Tendaron, kiun povas partopreni ĉiuj sovetaj esperantistoj.

Krasnojarsk (Siberio). La loka E-grupo organizis E-kurson por komencantoj kun 20 partoprenantoj. La kurson gvidas la malnova loka Esperantisto P. D. Agapov.

Drogobiĉ (Ukrainio). Ĉe la loka Pedagogia Instituto funkcias E-rondeto, kies vivon partoprenas 30 gestudentoj. En la Urba Kulturdomo funkcias alia E-rondeto, kie komencis lerni Esperanton ĉ. 50 personoj. La gvidanto de tiu E-kurso estas Gorodisskij L. I.

Leningrado. La aktivuloj de la E-Klubo nun estas okupitaj pri preparo de eventuala renkontiĝo okazonta en Leningrado komence

de junio, kun grupo de esperantistoj el GDR. Komence de julio okazos renkontiĝo kun grupo de esperantistoj, venantaj aŭtobuse el Finnlando. La renkontiĝojn amase partoprenos ankaŭ esperantistoj el aliaj sovetaj urboj.

Moskvo. En Moskva Internacia E-Klubo ĉiam okazas interesaj programoj, pri kiuj estas presataj sciigoj dissendataj al la membroj. Tre interesan prelegon faris N. F. Danovskij (januaro) pri la prol bemo, kial Esperanto venkis, dum Volapük, ĉi kaj aliaj pli postaj provoj pereis.

Tre sukcese pasis la kunveno, dediĉita al la Internacia Virina Tago. Sur la podio, kie sidis virina prezidantaro, pendis la emblemo de la paco — en la ringo blanka kolombo kaj virino. La kunvenon malfermis la veteranino N. D. Sulje. Aktualan raporton en Esperanto faris L. V. Erjuĥina. Kamarado M. Isaev dediĉis sian prelegon al la Virina Tago kaj al la malser-vutiĝo de la virinoj en la liberaj Orientaj Respublikoj, kiuj demetis vualon kaj fariĝis egalrajtaj al la viroj en ĉiuj sektoroj de la socia vivo. Poste al la ĉeestantoj estis demonstritaj du filmoj „Dagestana balado“ kaj „La tero, kiun mi amas“. Ambaŭ filmoj estas esperantlingve sonigitaj. Ilia montrado daŭris 1,5 horojn kaj tre plaĉis al la ĉeestantoj.

Sekvis gratuloj de E-organizoj kaj eksterlandaj geesperantistoj al la sovetaj virinoj-esperantistinoj. Fine — belarta programo.

Je la 12. III. 72 en MIEK okazis vespero de E-veteranoj. Pri la eminenta esperantisto prof. E. A. Bokarev, forpasinta antaŭ unu jaro, rakontis M. Lsaev.

Pri siaj interesaj rememoroj dum multjara E-agado rakontis la veterano G. P. Demidjuk (esperantisto de 1909). La vesperon aktive partoprenis ankaŭ la veteranoj Ivanov I. A., prof. Armand D. L., la poetino A. R. Tonti, Krajnov S. N. — parolintaj pri siaj neforgeseblaj rememoroj el la E-agado.

En la pluaj E-vesperoj de MIEK en m. marto kaj aprilo ĉ. j. estis tuŝitaj aktualaj problemoj: pri la estonta celebrado de la 50-jara datreveno de la fondiĝo de USSR el egalrajtaj liberaj respublikoj, pri multnombraj E-tendaroj kaj renkontiĝoj, pri tradukitaj verkoj en Esperanton, pri la festo de la arto kaj la internacia teatro, pri la kosma erao, pri la viveco de Lenin-ideoj, pri la naturgardo kaj sanprotektado. Akre pridiskutita estis la tre grava popolekonomia problemo — racie utiligi ĉiujn konatajn rimedojn por gardi kaj plibonigi la naturon kaj la vivmedion de la homo.

Informas: Teodoro Kulagin

Ĉe la E-veterano d-ro Skalskij

SENPRECEDENCA HEROEKO*

Je la 10 de februaro ĉ. j. ni celebris la 84-an naskiĝtagon de nia honora prezidanto d-ro A. K. Skalskij. En lia hejmo kolektiĝis 18 esperantistoj, plejparte junaj. Post multaj salutoj ni aŭskultis E-kantojn. Ankaŭ k-do Ĉan Kuan Ngok el Vjetnamio plenumis du kantojn en sia nacia lingvo.

D-ro Skalskij rakontis al ni pri siaj interesaj renkontiĝoj kaj konversacioj kun multaj kaj diversnaciaj samideanoj. Li ankaŭ montris sian faman E-albumon, komencitan en 1924. En ĝi lasis siajn aŭtografajn ankaŭ bulgaroj, ekz. k-do N. Aleksiev k. a.

D-ro Skalskij dediĉis al E-agado sian tutan vivon. Ankaŭ nun li estas plena de krea energio kaj planoj por estonta laboro.

La E-klubo en Novosibirsk 5-jara

Fine de marto ĉ. j. en Novosibirsk Centra E-Klubo okazis kunveno dediĉita al ĝia kvinjara jubileo. La kunvenon ĉeestis gastoj el Omsk, Barnaul, Ufa kaj la veteranoj de E-movado d-ro Skalskij kaj d-ro V. V. Butorin.

La prezidantino de la Klubo V. I. Vereŝĉagina raportis pri ĝia kvinjara agado. Dum tiu tempo la Klubo sukcesis organizi 60 lokajn esperantistojn. Funkciis kursoj por komencantoj kaj progresintoj. Estis organizitaj prelegoj, raportoj, ktp. Pasintjare en la urba galerio estis organizita internacia E-Ekspozicio de infandeseĝnaĵoj el 19 landoj. La ekspozicion vizitis 10350 homoj. En Novosibirsk Regiono estis organizita ankaŭ junulara esperantista konstruktamento, kiun partoprenis 65 studentoj el diversaj respublikoj de Sovetunio.

Dum la kunveno oni diskutis pri nova laborotendaro proksime de Novosibirsk.

S-anino V. J. Vereŝĉagina estis elektita honora membro de nia Klubo. Kelkaj aktivuloj estis premiitaj. Poste okazis bankedo kun dancoj kaj E-kantoj.

*Milica Sokolova,
Novosibirsk*

KUBANOJ INSTRUAS

La kerno de la novaj membroj de Universala Esperanto-Asocio en la insulo Kubo vige aktivigis en informado kaj instruado. Apogas ilin senpaga helpo de UEA en la formo de revuoj, vortaroj ktp. Novaj E-kursoj ekfunkciis inter la laborantoj de la Instituto por Normigo kaj Mezurado kaj ĉe la Akademio de Sciencoj. Inter pluraj lastatempaj radio-elsendoj kaj gazetartikoloj pri Esperanto estis artikolo en la revuo „Verde Olivo“, oficiala organo de la revolucia armeo de Kubo.

La nova kajero de „Por la Paco“ estas dediĉita al la 30-a datreveno de l'komenco de la Leningrad-blokado (septembro 1941 — januaro 1944). Ĝi enhavas 80 paĝojn ofsete presitajn. La abundaj kaj variaj materialoj estas preparitaj de granda grupo de leningradaj esperantistoj — aŭtoroj, tradukistoj kaj pentristoj.

La materialoj dividiĝas en du partojn: Leningrado dum la blokado kaj Leningrado en la postmilita periodo.

Oni ne povas trankvile legi la paĝojn, en kiuj estas priskribitaj la suferoj, la sinoferemo kaj la heroeo de la defendantoj de l'grandega urbo — de trupoj kaj loĝantaro — dum la 900-taga sieĝo.

Kun ne malpli granda intereso kaj emociiĝo oni legas la artikolojn pri la likvido de la postsignoj de la senprecedenca detruado, kiun la german-faŝista agresanto kaŭzis. Sento de feliĉo plenigas la koron, kiam oni ekscias pri la paca krea laboro de la heroo loĝantaro de l' urbo de Lenin, pri ĝia hela estonteco.

Pensiga, edifoplena kolekto.

A. Gr.

* *POR LA PACO. N-ro 10, Moskvo, 1971. Eld. Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj, 1971.*

LITERATURA PATROLKONKURSO 1972

La itala literatura rondo „La Patrolo“ organizas enkadre de la 43-a Itala E-Kongreso (en septembro 1972) internacian literaturan konkurson en la branĉoj poezio (maksimume 50 versoj) kaj prozo (maksimume 200×65 tajpitaj spacoj).

En ĉiu branĉo oni povas konkursi nur per unu verko, neniam premiita kaj neniam aperinta prese. La verkoj estu tajpitaj kun interlinia spaco. Oni sendu 4 kopiojn de ĉiu konkursaĵo. Sur ĉiu kopio estu skribita la branĉo, por kiu ĝi estas destinita, kaj la pseŭdonimo de la aŭtoro. Al la sendaĵo estu aldonita koverto, entenanta slipon kun pseŭdonimo, nomo kaj adreso de la aŭtoro. Sur la koverto oni skribu nur la branĉon kaj la pseŭdonimon. Oni enmetu ankaŭ tri respondkuponojn por sekretariaj elspezoj.

Validas nur la konkursaĵoj senditaj antaŭ la 1-a de julio 1972. Por ĉiu branĉo oni antaŭvidas 1-an, 2-an kaj 3-an premiojn.

Ĉion sendu al adreso: Patrolokonkurso 1972 ĉe „Literatura Foiro“, Via Pantano 17, I-20122, Milano, Italio.



ELNA, la landa asocio de UEA por Usono, planas profiti la favoran okazon, kiun prezentas al la usona Movado la okazigo de la 57-a Universala Kongreso de Esperanto en Portland (Oregon) en 1972. Apud novaj kursoj kaj instrumaterialoj ĝi preparis ankaŭ novajn informilojn. Jam aperis — en kunlaboro kun la inform-centroj de ELNA — tre trafa dukolora broŝuro „The abc's of Esperanto“, eldonita de kompanio Channing Bete, kiu speciale okupiĝas pri edukaj materialoj, lernolibroj ktp. ELNA tuj aĉetis 500 ekzemplerojn. Samtempe ELNA mendis ĉe UEA la presigon de 40 000 ekzempleroj de alia anglalingva informilo. La proksimiĝo de la Kongreso en Portland jam ebligis aperigon de pluraj artikoloj en la usona gazetaro.

ESPERANTO KAJ SOCIOLOGIO

Ĝus aperis grava sociologia studo pri „Esperanto kiel socia kaj lingva movado“, verkita de la juna brita sociologo Peter G. Forster. S-ro Forster, kiu laboras en la Universitato de Hull, estas kunlaboranto de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED).

Sociologia studo de s-ro Forster pri la brita Esperanto-movado jam aperis kiel dokumento de CED en la angla kaj en Esperanto. Lia nova studo estis preparita por la 7-a Monda Kongreso de Sociologio kaj prezentita tie, en Varna (Bulgario), en 1970. Nun ĝi aperis du lingve, en la angla kaj itala, en lingvistika revuo.

KURSOJ KRESKAS EN RUMANIO

Kreskas la nombro de Esperanto-kursoj en Rumanio. En la nova kresko ludas gravan rolon la 70-jara instruisto Petro Fetoju, kiu gvidas plurajn kursojn samtempe. En la Universitato de Krajovo li instruas Esperanton al 63 gestudentoj. Lernas ankaŭ pluraj profesoroj univesitataj kaj liceaj. Laŭ raporto de s-ro Fetoju, la sama universitato presigis lernolibrojn de Jozefo Petrin. En la Pionira Domo lernas 81 infanoj, kaj el la Ŝtata Liceo de Muziko kaj Arto kvar grupoj sekvas liajn kursojn. Dudeko da liceanoj el diversaj lernejoj, 15 oficistinoj el la Universitato, grupo da fervojistoj — jen nur kelkaj el la aliaj klasoj, kiujn senpage gvidas nia veterano. Gravan apogon donas al li lokaj aŭtoritatuloj, precipe la Estraro de la Krajova Universitato.

Dum la okuloj de la Esperanto-movado estas ankoraŭ turnitaj al Usono, kie okazos la 57-a Universala Kongreso de Esperanto, en Portland, Oregon, la organizantoj de la kongresoj jam devas plani por la sekvaj jaroj. La Estraro de UEA ĵus elektis kiel kongresurbon por la jaro 1974 la urbon Hamburgo en la norda parto de Federacia Respubliko Germanio. Samtempe la Estraro aprobis la okazigon de Oficiala Postkongreso en Ateno, Grekujo, post la Universala Kongreso en Beograd, Jugoslavio (datoj de Beograd: 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 1973). La kongresurboj por 1975 kaj la postaj jaroj ankoraŭ ne estas elektitaj.

„MEDICINISTAJ INFORMOJ“

„Medicinistaj Informoj“ estas regula cirkulero, aperanta 6-foje dum jaro. Ĝi alportas medicinistajn novaĵojn el la tuta mondo. Jara-bono 20 kcz aŭ egalvaloro (2 US dol). Mendu specimenon ĉe Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Medicina Sekcio, Praha 2, poŝtkesto 3, Ĉeĥoslovakio. La bulteno estas daŭrigo de la estinta bulteno „Medicinistaj Novaĵoj“, eldonita en Ĉesky Duh, Ĉeĥoslova'io.



Sur la foto: s-ano P. Fetoju kun siaj studentoj.

ĉarma lando

„TURISMA BULGARIO“

Sub tiu titolo aperis senpaga esperantlingva luksa prospekto, 16-paĝa, multkolora, riĉenhava, eldonaĵo de la Komitato de Turismo en Popola Respubliko Bulgario. Per trafe elektitaj ilustraĵoj kaj konciza teksto ĝi informas pri ĉarmaj vizitindaj anguloj de la lando: loĝlokoj kaj muzeoj, ripoz- kaj banlokoj ĉe Nigra Maro (Slânĉev Brjag, Zlatni Pjasaci, Druĵba, Albena, Rusalka, Juĵni Bregove k. a.), en la montaroj (Pamprovo, Borovec, Aleko k. a.) mineralakvaj fontoj, naturaj fenomenoj (Rokoj de Belogradĉik, la groto „Ŝaeva Dupka“ k. a.), antikvaĵoj, tradiciaj bulgaraj festoj kaj kutimoj ktp. La prospekto donas ankaŭ kelkajn aliajn informojn — pri historio, fervojoj, ŝoseoj, vojaĝkostoj, turistaj oficejoj kaj agentejoj ktp.

En la prospekto oni povas legi: „Popola Respubliko Bulgario de 1967 ne postulas vizojn de civitanoj de kiu ajn lando, kiuj venas al Bulgario turistele kaj restas sur ĝia teritorio ne malpli ol 48 horojn kaj ne pli ol 2 monatojn“. Do — sen vizoj, sen formalajoj! Nur regula pasporto por eksterlanda vojaĝo!

Eksterlandaj samideanoj, se vi deziras senpagajn prespektojn „Turisma Bulgario“ kaj pliajn vojaĝinformojn, adresu vin al:

Komitato de Turismo, pl. Lenin 1, Sofio, Bulgario.

POR LA MALGRANDA ESPERANTISTO

LA RUZA JUĜISTO

En la domo de iu homo malaperis lia monujo kune kun la mono. La homo iris al la juĝisto kaj diris:

— Via Moŝto! Ĉi-nokte oni ŝtelis mian monon. En mia hejmo loĝas multaj homoj, kaj mi ne scias, kiu el ili meritas malestimon.

La juĝisto diris:

— Venigu viajn hejmanojn antaŭ min morgaŭ ĉe sunleviĝo kaj mi montros al vi la ŝteliston.

Kiam ĉiuj hejmanoj kolektiĝis ĉe la juĝisto, li diris:

— Nun mi donos al ĉiu el vi po unu kana vergeto. Morgaŭ matene vi redonos ilin al mi. Kaj sciu, ke la vergeto de tiu, kiu ŝtelis la monon, elkreskos per unu fingro pli longa dum la nokto.

La ŝtelisto ektimis kaj komencis pensi, kiel trompi la juĝiston. Pensis

pensis kaj decidis: „Mi mallongigos la vergeton ĝuste per unu fingro. Dum la nokto ĝi elkreskos kaj fariĝos kiel la ceteraj“.

La matenon ĉiuj iris al la juĝisto. Ĉies vergetoj estis egalaj, nur la vergeto de unu el ili estis per unu fingro pli mallonga ol la aliaj.

— Jen kiu ŝtelis la monon! — ekkriis la juĝisto kaj ordonis, ke oni ĵetu la ŝteliston en malliberejon.

El la bulgara

Jordan Markov



TURISMA BUL GA RIO

Al ĉiuj homoj en la mondo Bulgario proponas siajn naturajn belajojn, riĉan historion, rimarkindajn monumentojn de la kulturo, demokratian vivmanieron, vivan nacian folkloron, novan vivon.

Formata dum la jarcentoj, la proverba bulgara gastamo estas sentata ĉie en la lando.



DIMITROVA LULKANTO

Teksto: *Najden Vâlcev*

Muziko: *K. Petrov*

Trankvile



Tuta universo dormas en trankvil',
regas nokt' malhela, dormu, mia fil'! (2)

Frue ekdorminta ne plu lumas lun',
nur la Maŭzoleo blanke brilas nun. (2)

Dormu, kresku granda, dormu nun infan',
por estiĝi forta vir'-Dimitrovan': (2)

Baldaŭ vi elkreskos forta, en liber',
kaj kun vi la vivo floros sur la ter'. (2)

El la bulgara: *Simeon Simeonov*

PIONIRA ELSENDO

Unuafoje la 26-an de novembro 1971 okazis radio-elsendo pri la Internacia Lingvo el egipta radio-stacio. Estis intervjuita du egiptaj membroj de UEA, d-ro Nassif Isaac, delegito en Aleksandrio, kaj s-ro Ahmed A. Ĥadr. La intervjuanto aparte interesiĝis pri la deveno de la vort-materialo de Esperanto kaj pri ĝia literaturo. D-ro Isaac povis montri al ĉirkaŭ 700 vortoj komunaj inter Esperanto kaj la araba lingvo, ekzemple „kakao“, „palto“, „teatro“ k. a.

Sendube plifortiĝas la intresigo pri Esperanto en Egipta Araba Respubliko, kie feliĉe, nun disponeblas vortaroj, lenolibroj kaj informiloj en la araba.



Georgi Dimitrov inter siaj amataj geamikoj — la junpioniroj

Ĉefredaktoro: Kunĉo VÂLEV

Redakta komitato: Bojka BATALSKA, Asen GRIGOROV, Tatjana EVSTRATIEVA, Venelin MITEV, Stefka ĤRISTOVA, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 83-26-82

En ĵ. „**Oteĉestven Zov**“ — Vraca (22. X. 1971) — „Verda Raketo“ sur la plej alta orbito — informo pri la unua lernanta E-societo en Bulgario, fondita la 18-an de marto 1968.

En la sama ĵurnalo (9. XI. 1971) — informo, ke la esperantistoj en Vraca kaj ĝia distrikto aktivas.

En ĵ. „**Zarja na Komunizma**“ — Loveĉ (30. X. 1971) — artikolo „Kontraŭ la naziismo kaj novfaŝismo“ de Albrecht Metzkes kun indiko, ke tradukis el Esperanto Ilija Ivanov (el „Bulgara Esperantisto“ № 6 (1971)).

En ĵ. „**Rabotniĉesko Delo**“ (15. XI. 1971) en la rubriko „El nia heroo pasinteco“ artikolo „Mi batalis por la libero...“ de Ekaterina Botuŝeva, kiu rakontas, ke Nikola Botuŝev, heroo en la kontraŭfaŝista batalo, pendigita de la faŝistoj, lernis matematikon, fizikon, rusan, germanan, francan, Esperanton.

En la sama ĵurnalo (18. XI. 1971) — informo ke la Sofia E-Societo „M. Gorkij“ organizis, kunvenon dediĉitan al la 25-jara datreveno de la fondiĝo de Unesko.

En la sama ĵurnalo (25. XI. 1971) en artikolo „Ĉiutaga kontrolo por plenumo de la akceptitaj decidoj“ oni informas, ke Todor Ĵivkov, unua ŝefsekretario de BKP kaj prezidanto de la Ŝtata Soveto, vizitis la turistan komplekson „Esperanto“, situantan proksime de urbo Orjaĥovo sur la bordo de Danubo.

En ĵ. „**Komsomolska Pravda**“ — Plovdiv (15. XI. 1971) — informo de Marija Atanasova „Scienca konferenco de esperantistoj“ (pri la VI Nacia Studenta E-Konferenco en Plovdiv kun prelego de Boĵidar Leonov kaj partopreno de la japana studento Sasama Toŝiaki).

En ĵ. „**Oteĉestven Glas**“ — Plovdiv (16. XI. 1971) — informo de F. Miĥajlova pri la „Nacia Studenta E-Konferenco“ en Plovdiv.

En ĵ. „**Sever**“ (por literaturo kaj arto), aldono al ĵ. „**Dunavska Pravda**“ — Ruse (21. X. 1971) — artikolo de Jakov Jakov pri la partopreno kaj sukcesa prezento de la Pupa Teatro de Ruse en la Internacia Festivalo de la Pupteatroj en Zagreb 2–9. X. 1971).

En „**Avtostroitel**“ — Ŝumen (29. XI. 1971) — longa artikolo kun bildo de Rajna Stanĉeva „La esperantistoj rakontas“ (pri la partopreno de esperantistoj el la Aŭtomobila Uzino „Madara“ en la esperantistaj ferioj ĉe Balta Maro, Pollando, kaj pri la varia agado de la E-Societo „Progreso“ ĉe la Uzino).

En ĵ. „**Veĉerni Novini**“ (6. XII. 1971) — informo pri publikigo en Vjetnamio de du

versaĵoj de Blaga Dimitrova en Esperanto (tradukis As. Grigorov) kaj versaĵo de Angel Todorov (tradukis Canko Murgin).

En la sama ĵurnalo (8. XII. 1971) en la humora paĝo oni mencias Esperanton.

En ĵ. „**Septemvri**“ — Bjala (16. XII. 1971) — informo de Simeon Baltaĝiev titolita „112 jaroj de la naskiĝo de D-ro Zamenhof“.

En ĵ. „**Orbita**“ (18. XII. 1971) en la artikolo „Pasigrafio“ interalie oni rakontas, ke nur Esperanto sukcesis enradikiĝi en iujn sferojn.

En ĵ. „**Pravna Tribuna**“ — Sofio (28. XII. 1971) — informo de N. Nikolov pri la kunidoj de l' Internacia E-Asocio de Juristoj en Londono en la kadro de la 56-a UK de Esperanto kaj la partopreno de la bulgaraj juristoj-esperantistoj, aparte pri la aktiveco tie de Genĉo Genĉev, bulgara esperantisto-juristo.

En ĵ. „**Podem**“ — Polski Trâmbeŝ (31. XII. 1971) — du informoj: la unua pri gratuloj ricevataj el eksterlando (USSR kaj Japanio) kaj la dua pri la agado de la E-societo ĉe la Bazo por Teknika Evoluo.

En ĵ. „**Ŝumenska Zarja**“ (6. I. 1972) Ĉvjatko Todorov en artikoleto „Amikaj leteroj“ rakontas, ke la esperantistoj en Ŝumen riĉevis multajn E-leterojn el eksterlando.

En ĵ. „**Rabotniĉesko Delo**“ (10. I. 1972) en la rubriko „Sciigoj el la lando“ oni rakontas pri la distrikta konferenco de la esperantistoj en urbo Pazarĝik.

La sama informo aperis ankaŭ en la sofia ĵ. „**Veĉerni Novini**“ (13. I. 1972).

En ĵ. „**Rabotniĉesko Delo**“ (11. I. 1972) en la artikolo „Kresku inda juna generacio“ Deĉko Leĉev, direktoro de la Junulara Domo en Ŝumen, rakontas, ke la Klubo ĉe Internacia Amikeco ĉe la domo havas tri sekciojn — „USSR“, „Pollando“, „Hungario“. En la klubo oni studas ankaŭ Esperanton.

En „**Filatela Bulteno**“ n-ro 27/1971 (Varna) oni publikigas vortaron de la filatelisto, kiu korespondas en Esperanto, verkitan de docento Georgi Dimov. Oni daŭrigos ĝin en la sekvaj numeroj de la Bulteno.

PROSPEKTOJ EN ESPERANTO

Békéscsaba. Aperis en Esperanto kolora prospekto pri tiu sudorienta urbo de Hungario. Petu ekzemplerojn kaj turistajn informojn de *Békés megyei Idegenforgalmi Hivatal, Békéscsaba, Tanácsköztársaság utja 10, tel. 12-692.*

Mannheim. La trafik-oficejo de tiu urbo eldonis novan, duan laŭvice, faldprospekton en Esperanto. Kun plezuro ni notas ankaŭ la fakton, ke la urbo jam havas Zamenhof-straton (laŭ decido de la magistrato de 29. II. 1972). Prospektojn kaj pliajn informojn vi povas ricevi de: *Verkehrsverein 68, Mannheim, Bahnhofplatz, Federacia Respubliko Germanio.*